



Familia

ESPERANTO

N-ro 48 – aŭtuno-vintro 2007

Ĉarma knabino ŝnurludas
dum IK 2007 en Jokohamo (p.4-5)



...kaj juna ĉinino gastas kiel
“*au pair*” en franca E-familio (p.14)

Vortoj de la redaktoro

Karaj legantoj,

Unue koran dankon al tiuj, kiuj sendis al mi pozitivan mesaĝon post apero de *Familia Esperanto* n-ro 47. Eĉ se mi ne ĉiam respondas, sciu ke viaj afablaj vortoj ĝojigas min. Dankon ankaŭ al tiuj kiuj proponas kontribuon enhavan. Ĝis nun mi, kiel redaktoro, estis bonŝanca, kaj ĉiu artikolo ricevita estas interesa kaj publikigita. Lastan dankon mi sendas al Valeri Belov pro lia valora helpo pri bildoj.

En tiu ĉi lasta numero de 2007, vi trovos multe da materialo kiu iel rilatas al Azio: raportoj pri infanvartejo kaj Internacia Infana Kongreseto dum UK en Jokohamo, prezento de korea esperanta familio, sperto de ĉina junulino kiel "Au pair" en Francio, ktp. Dum eŭropanoj plendas ke UK estas malproksima, ĝojas azianoj ke finfine ili havas monon kaj libertempon por partopreni internacian aranĝon... Tamen, eĉ por multaj azianoj la ĉi-jara kongreso tro malproksimis. Eble oni devus aranĝi UK-on en Eŭropo nur ĉiun 8-an aŭ 10-an jaron? Kio certas, tio estas ke ni devas pli ekster-eŭropiĝi, kaj en kongresoj kaj en FE.

Sed mi revenu al Eŭropo, kaj al mia loĝlando Norvegio. Mi decidis honorigi la memoron de Jon Rømmesmo, kiu mortis la 1-an de aŭgusto 2007, en aĝo de 84 jaroj. Jon Rømmesmo ĉiam parolis en Esperanto al siaj tri infanoj, kaj li frue verkis kantetojn, rimajojn, kaj aliajn lingvajn ludojn por infanoj en esperanto. Kun permeso de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj), mi ĉerpis el lia libro *Fantaziaĵoj kaj kantoj por infanoj* eldonita en 1995. Sur paĝoj 8-10 vi trovos kelkajn el liaj daŭre

legindaj kaj uzindaj verkoj. La poemeton *La tomato kaj la cepo*, kiun vi povas legi sur lasta paĝo, Jon Rømmesmo fakte tradukis el la norvega speciale por FE, laŭ mia peto, kelkajn monatojn antaŭ ol li forpasis.

Claude ROUGET

Interŝanĝa servo

ILEI afable permesis ke *Familia Esperanto* uzu materialon el la libro *Fantaziaĵoj kaj kantoj por infanoj* de Jon Rømmesmo. Ni kompanse volonte reklamas ke ĝi estas aĉetebla en la libroservo de ILEI kontraŭ 3,60 € + sendokostoj. La adreso de ILEI estas Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando. ✉ ieio01@tiscali.nl

Enhavo

Pasintaj aranĝoj

Infanvartejo dum UK k. c.	3-4
Internacia Infana Kongreseto	4-5
29-a REF en Hungario	6

Estontaj aranĝoj

Kiu E-aranĝo por Novjaro?	7
---------------------------------	---

Por infanoj

La semajno (Jon Rømmesmo)	8
Ni iris sur vojeto (trad. J. R.)	9
La porko kaj ĝiaj vivkondiĉoj.....	10
Skribu al Avo Frosto	16
La tomato kaj la cepo (poemo)	16

Esperantaj familioj

Familio Kim el Koreio	12-13
E-familioj en Pasporta Servo	13

Familia vivo/edukado

"Au pair" parolas Esperanton	14-15
------------------------------------	-------

Diverse

Porinfanaj filmoj en Esperanto	11
Mallongaj anoncoj.....	15

Familia Esperanto

estas bulteno por kaj pri esperantlingvaj familioj.

Aperas trifoje jare: en februaro, junio kaj oktobro.

Redaktofino ĉi-numera: 2007.10.31

Redaktoro

Claude Rouget
rypev68-fe@yahoo.no

Eldonanto

Rondo Familia de UEA
(A.Wandel, J.Lindstedt,
B.Schumann, C.Rouget)
uea.org/rondo_familia/

Abonkotizo

- libervola pago de 10 € al UEA-konto *idoj-p*
- senpage elŝutebla el retejo de Rondo Familia

Limdato por kontribuoj al venonta numero: 2008.02.02

E-familioj en Japanio kaj aziaj landoj

Tio ĉi estas raporto pri Infanvartejo en UK-Jokohamo kaj pri situacio de aziaj esperantistaj familioj.

Mi esperas, ke mia raporto kaj propono kongruas kun celo de Rondo Familia ligi esperantistajn familiojn, kun komuna intereso inter vi kaj mi, unu el azianoj.

En Eŭropo jam ekzistas Rondo Familia kun 50-jara historio pri familiaj renkontiĝoj. Dume Azio estas pluroble pli vasta ol Eŭropo kaj pro tio necesas pli multe da mono kaj libertempo por veturi ol en eŭropaj landoj. Samtempe malmultaj esperantistaj familianoj uzas Esperanton kiel sian hejmlingvon pro unulingva situacio de loĝlando. Tial estas malfacile okazigi familiajn renkontiĝojn. Tamen okazis du aranĝoj por infanoj dum la Universala Kongreso (UK) de Esperanto en Jokohamo, Japanio, en 2007. Unu el la aranĝoj estis IIK (Internacia Infana Kongreseto): ĝi estas unusemajna feria kunveno por infanoj inter 6 kaj 13-jaraj, kiuj flue parolas la internacian lingvon Esperanto. Kaj la alia estis Kongresa Infanvartejo (foto ĉi-sube), kies celo estis liberigi partoprenantajn akompanantojn de iliaj infanoj dum UK. Pri ĝi mi respondecis kiel membro de LKK de la 92-a UK.



kun 32 infanoj en Jokohamo el kvar landoj de la 4-a ĝis 11-a de aŭgusto 2007.

Ni vartantoj ne postulis de infanoj havi kapablon de Esperanto al infanoj de 0-jara bebo ĝis 14-jaraj geknaboj. Venis 28 infanoj el Japanio, du el Koreio, unu el Pollando kaj unu estis japanloĝanta usonano. Ilia ĉefa lingvo estis la japana, bedaŭrinde, sed nature. Ili pasigis kelkajn horojn en unu-du tagoj aŭ ĉiutage en la infanvartejo. Kiam du polinoj vizitis vartejon kaj amuzigis infanojn per Esperanto kun interpretisto ekfariĝis internacia etoso. Ĉio funkciis bonorde dum la kongresaj tagoj kun helpo de 24 helpantaj vartistoj.

Unu monaton antaŭ la kongreso, preskaŭ neniu familio intencis partopreni en UK. Sed mi konstatis dekelkajn familiojn enlandajn kaj fakte venis multaj infanoj kun sia akompananto, el kiuj, precipe patrinoj. Multaj el ili unuafoje partoprenis en UK kaj ofte kun neesperantista edzo. Unue ili evitis partopreni en kongreso pro zorgo pri sia(j) infano(j) aŭ pro sia laboro aŭ financaj konsideroj aŭ kontraŭo de sia edzo. Malgraŭ tio, la patrinoj finfine partoprenis en UK kaj konatiĝis kun aliaj E-familianoj enlandaj kaj najbarlandaj. Ili spertis esperantan praktikecon kaj sentis la solidarecon, unu grandan rondon familian. Nun multaj el ili revenas hejmen kaj vivas senrilate al Esperanto. Necesas instigo por daŭre kreskigi esperantistajn familiojn.

Kvankam oni povas legi "OFICIALA ORGANO DE RONDO FAMILIA DE UEA – CIRKULAĴO POR ESPERANTLINGVAJ PAROJ KAJ FAMILIOJ" en fronta



Sur la foto (venonta paĝo) vi vidas kutiman scenon: en Solena Fermo sur la podio staras IIK-anoj jam tradicie, sed ankaŭ novan: kvin infanetoj kun kvin patrinoj kaj ses vartantoj el la Kongresa Infanvartejo. La 38-a IIK okazis en Jamanasi, Japanio, kun 13 infanoj el kvin landoj kaj paralele kun ĝi okazis ankaŭ Infanvartejo

paĝo de FE, troviĝas informo pri PSI kun tia klarigo: “Male ol en REF, oni en PSI tradicie ne postulas, ke ĉiuj partoprenantaj familianoj sciu Esperanton”. Ĉu familioj kun infanoj nedenskaj povos partopreni en PSI? En Azio, oni ne konas diversajn eventojn por familianoj, male de la fama IIK. Malmultaj esperantistoj scias pri la ekzisto de ĉi gazeto, do, mi prezentos al konatoj ĉi organon, kun informoj pri familiaj eventoj kaj artikoloj por kaj pri esperantlingvaj familioj. Post UK mi proponis al akompanantoj de la infanoj korespondi kun aliaj E-familianoj kun infanoj samaĝaj, interŝanĝi fotojn kaj desegnaĵojn kaj aliĝi al Pasporta Servo. Se vi planas vojaĝi al Japanio, vi povus kontakti multajn familianojn kun infanoj.

Malmultaj E-familioj en Azio?

Antaŭ la preparo de aranĝoj por UK mi deziris scii kiom da esperantaj familioj

ekzistas en Azio por pritaksi eblecon okazigi aranĝojn por infanoj. Mi alvokis aziajn esperantistojn respondi en dissendolisto [Azio] kaj havis jenan rezulton en decembro 2005: en Irano 5 familioj, en Kantono (Ĉinio) 1, en Tajvano 2, en Mongolio 1, en Pakistano 1 (geedzoj kun lernantinoj), kaj 0 familio sed semadas en Barato, oni respondis. Neniu respondis el Koreio kaj Japanio. Tamen en realeco jam ekzistas kelkaj esperantistaj familioj. Mi sciis, ke en ĉi septembro estas novnaskito en iu E-familio: filino de patro japana kaj patrino korea. La patro diris al mi, ke li alparolos al sia bebo japane kaj ŝi alparolos koree, Esperanto estas komuna inter geedzoj.

Ne forgesu, karaj legantoj, ankaŭ ekzistas kaj kreskas esperantistaj familioj en Azio. Necesas ligi esperantistajn familiojn tutmonde.

SANO JOŬKO



Internacia Infana Kongreseto en Jacugatake

Ĉi-somere okazis Universala Kongreso (UK) en malproksima kaj multekosta lando. Tute klare multaj familioj resp. infanoj ne povis vojaĝi al Japanujo. Eĉ ne klaris ĉu Internacia Infana Kongreseto (IIK) entute eblus apud Jokohama UK.

Pri tio mi diskutis kun Judita Rey dum IIK 2006 en Prato/Italujo. Ŝi jam sukcese gvidis renkontiĝojn por infanoj kaj povus organizi ian IKn, ekz. en E-domo en Rijeka/Kroatujo. Sed ne klaris, kiel la infanoj el diversaj landoj povus veni al Rijeka. Solvon trovis la organizantoj de la 7-a Kongreso de

Eŭropa E-Unio en Maribor/Slovenujo, nome proponi al kongresantaj gepatroj venigi siajn infanojn al EIK. Dum gepatroj ĝuis altnivelajn prelegojn, gefiloj ĝuis altmontajn ludojn kun Judita. Eble tiun unuan EIK sekvos aliaj?

Antaŭ kaj dum IIK 2006, kelkaj gepatroj diris al mi, ke ili certe vojaĝos al Japanujo kun siaj gefiloj kaj bezonus IIK-on. Sed tiun ideon ne subtenis la Roterdama UK-responsulo, ĉar malmulte da IIK-aliĝantoj altigas riskon pri deficitita UK. Ja IIK estas programero de UK. Tamen lobiado de kelkaj

estraranoj “denaskism-emaĵ” forviŝis ĉiujn skrupulojn. Sekvan malhelpon prezentis neekzisto de taŭgaj infanteriejoj en Japanujo, tiel kutimaj en Eŭropaj landoj. Ja en japana kulturo, gepatroj laboras dum tuta jaro kaj infanoj dum lernejoj vizitas siajn geavojn. Lernejoj grupoj foje restadas dum semajnfino en feriejoj, sed por intense lerni lingvon aŭ praktiki sporton. Kaj tiuj ejoj tro kostis. Savan solvon ofertis la komitatanoj de la E-domo de Jacugatake, kiu akceptis malkoste rezervi la Domon por IIK.

La E-domo havis taŭgan grandecon: 15 litoj [eŭropstilaj] kaj kelkaj futonoj [japanstilaj] por 13 infanoj kaj 8 plenkreskuloj. Do 13 infanoj el 5 loĝlandoj kaj 8 denaskaj lingvoj. Kiel lastjare dominas la franca lingvo. Enigmo: *Kiu lango parlas la krokodilojn?* Jen niaj metodoj malkrokodiligaj: (a) Ĉe ĉiu tablo estis sidloko rezervita por unu plenkreskulo, kiu taŭge instigu ĝustan lingvouzon. Tio foje helpis. (b) En ĉiu dormĉambro estu infanoj el diversaj lingvoj. Tio ne plene eblis kaj nur parte sukcesis. (c) Gurdi “ne krokodilu” aŭ “kion vi diris?” aŭ laŭte koleri. Tio iom helpis dum kelka tempo, sed ne tre taŭgas. (ĉ) Ĉiutage, dum la tri antaŭtagmezaj horoj, por ĉiuj, en grupoj, okazis t.n. “Paroligaj Tempoj”. Joŝi zorgis pri la plej junaj. Bea kun knabinoj preparis filmon *Korelativa Danco*. Alano kun knaboj ekzercis japanan masko-teatraĵon *Momotaro*. Ĉiuj infanoj kunlaboris, sed iuj aktivecoj estis tro ambiciaj, tro longaj, riskantaj tediĝon, do plibonigendaj. (d) Komuna kantado antaŭ ĉiu manĝo. Ne multaj kantis entuziasme laŭte, sed multaj mallaŭte.

La E-domo taŭgas por dormi kaj studi, sed ne por eksteraj ludoj. Tial posttagmezojn ni pasigis aliloke. (a) Al gimnastika halo loka lernejo ni iris trifoje por japanaj ludoj, Tekeo-ludo, sporta olimpiko, kantado kun pian-akompano, ekzerco de la teatraĵo. Japanaj infanoj el la ĉirkaŭaĵo venis por ludi kun ni kaj spekti kantojn kaj teatraĵon sur podio. Sciu, ke tiuj haloj en japanaj lernejoj estas mult-funkciaj, en ĝi okazas sporto, kunvenoj de lernantaro, prezentoj aŭ koncertoj sur podio. Lernejoj kutime havas propran naĝejon, sed tiun ni ne rajtis uzi. (b) Ni vizitis urban naĝejon, kiu ne plaĉis, ĉar striktaj reguloj permesis nur naĝi aŭ stari en akvo, sed ne petoli. (c) Tial pli plaĉis japanstila banejo *Onsen*, en kiu oni komence sidante duŝas kaj bone lavas sin, poste sidas en varmakvaj basenoj aŭ saŭno por rilaksi

sin. (ĉ) Ni migris tra bambu-arbaro al akvofal-aro, tie piknikis, ludis, ripozis, kontemplis. Por japanoj, akvofaloj estas banalaĵo, ĉar 70% de la lando konsistas el montaro, multaj riveretoj kaj akvofaloj. (d) Tuttaga ekskurso kondukis nin al urbo Macumoto kaj ĝia ligna kastelo, la sola japana kastelo en origina stato.

IIK en Japanujo proponis tipajn japanajojn: (a) Grupoludoj kiel Ĝan-Ken-Poi-traĵno. (b) Paperfaldado “origamo”, i.a. prezentata dum la Solena Fermo de UK. (c) Pladoj kun nekutimaj gustoj kaj ingrediencoj, kiujn la infanoj parte malŝatis. (ĉ) Pac-vespero, dum kiu s-ro Sasamori rakontis pri sia vivo kiel infano dum brulbombardado de Tokio en la dua mondmilito. (d) Ŝu-regulo, kiu postulas ŝanĝi siajn ŝuojn je ĉiu ekstera pordo.

Per ĉi tiu artikolo estu dankataj al gesamideanoj Sasamori, Oota, Motoki, Noriko, Alano, Bea, Joŝi, Berto, lokaj e-istoj kaj komitatanoj de la E-domo de Jacugatake, kiuj sukcesigis la IIK-on 2007.

BERT SCHUMANN



Kelkaj IIK-anoj antaŭ la kastelo de Matsumoto

29-a Renkontiĝo de Esperanto-Familioj

La 29-a REF okazis de la 22-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2007. La tendaro estis organizita en la feriejo “Tisza-füredi Ifjúsági Tábor” en la montaro Bük, pitoreska regiono 160 km oriente de Budapeŝto.

Ni loĝis en lignaj domoj, kiuj situas en bela valo sur dekliva tereno, unuflanke kun barilo, la alian flankon baras rivereto. Partoprenis la Renkontiĝon 20 familioj, entute 68 homoj, kies infanoj pli malpli komprenas, multaj tre bele parolas Esperanton.

Al la programo kontribuis la partoprenantoj mem: komuna kantado, manlaboro, desegnado, sportludoj, muzikado, lingvaj ludoj, fabelo-legado kaj -verkado, naĝado, migrado, preskaŭ vespere tendarfajro, ktp. Estis antaŭorganizitaj programoj, diversaj ekskursoj al belaj hungaraj urboj kaj al kuracostrandoj en la ĉirkaŭaĵo.

Ni menciuj kelkajn programerojn inter multaj. Jam la duan tagon ni montogrimpis sur monteton Dédes, kie troveblas fortikaĵruino. Multfoje ni vizitis kuracbanejojn.



Ekzemple iun posttagmezon ni veturis al Miskolc-Tapolca (parto de la urbo Miskolc, kie ni interalie vidis ankaŭ la faman kaj belan kastelon antaŭ la baniĝo), kie troviĝas la fama “Barlangfürdő” – grot-banejo.



Aliaj ekskursoj celis al urbo Kazincbarcika kaj Eger, kie troveblas ankaŭ tre bonegaj banejoj. Plurfoje ni vizitis la proksiman kaj faman urbeton Szilvásvár, kie oni povis elekti el inter diversaj programeblecoj. Tie vivas la fama ĉevalaro “Lipicai”; ni vojaĝis per monta historia trajneto; kelkaj admiris la akvofalon “Fátyol”, kvankam pro la varmeco estis malmulte da akvo en rivereto; kelkaj en alia direkto ekrigardis la „Gardisto de Karpatoj”; aliaj montogrimpis al la elvidejo kaj al la Groto de prahomoj.

En la dua semajno ni vizitis en Szilvásvár la “grimp-ĝardenon”, kie etuloj, junuloj kaj plenkreskuloj povis sin ekprovi en danĝeraj montogrimpaj situacioj inter branĉoj de la altaj arboj, ĉar ni devis grimpi, gliti, akrobati supre, en 8-10 metra alteco, ktp.

Krom feriado, la ĉefa celo de la aranĝo estis aktivigi la esperantan lingvokapablon de la infanoj. Dum la du semajnoj la pli aĝaj gejunuloj kaj la plenkreskuloj kune kantis, ludis, sportis kun etuloj, kiuj ĉi tiel ludante lernis, evoluigis, progresigis sian lingvokapablon.

Mi tutkore kredas, ke ĉi tiu Renkontiĝo, la 29-a, restos neforgesebla memorajo por ĉiuj partoprenantoj, kaj elkore mi atendas la 30-an Renkontiĝon en 2008 ie, en Eŭropo, kie ni denove renkontiĝos unu kun la alia, kiel granda familio de Esperantujo.

JULIANNA VAS-SZEGEDI

Kiu novjara E-aranĝo ĉi-jare?

Kiel Amri Wandel menciis en numero 46 de Familia Esperanto, ekzistas minimume tri aranĝoj en Eŭropo por novjarfestemaj esperantistoj, nome Internacia Festivalo (la plej malnova el la tri), Nova Renkontiĝo kaj Ago-Semajno. Kion partopreni?

Familia Esperanto skribis al la organizantoj de la tri renkontiĝoj, demandante kiom da infanoj jam estas aligitaj al ilia respektiva aranĝo ĉi jara kaj ĉu iu speciala programo estos organizita por infanoj (sub 12 jaroj). Jen la respondoj, kune kun aliaj utilaj informoj por familioj, ĉerpitaj el la retpaĝoj de la respektivaj organizantoj.



24-a Internacia Festivalo

2007.12.27 – 2008.01.03,
Düsseldorf, Germanio

Jen malnova renkontiĝo bone organizita de Hans-Dieter Platz jam de multaj jaroj. Krom al ampleksa programo kies ĉefa temo estas vojaĝoj, okazos ankaŭ ekskursoj kaj koncertoj. Ĉi-jare ĉeestos Kajto kaj JoMo.

IF bedaŭrinde ne respondis al demandoj de FE pri programoj por infanoj kaj nombro de jam aligitaj infanoj. Sed sur retpaĝaro de IF, eblas legi jenon:

- ◆ Infanoj havu laŭeble lingvajn konojn en Esperanto
- ◆ Paralela dumtaga programo por infanoj (laŭ aĝgrupoj) sub gvido de kunlaborantoj
- ◆ Subtrijar(in)oj estas senkotizaj, sed gepatroj mem okupiĝas pri ilia prizorgo/mangxo
- ◆ Je dispono estas infanaj litetoj en limigita kvanto

Pliajn informojn pri Internacia Festivalo vi trovos tie: <http://internacia-festivalo.de/>

6-a Nova Renkontiĝo

2007.12.27 – 2008.01.03, vilaĝo
Föckinghausen (Germanio)

Lu Wunsch-Rolshoven informas la 26-an de oktobro:

Estas ampleksa programo por infanoj, en kiu oni ofertas kutime plurajn manlaborajn grupojn kaj jam oni planas

denove infanan teatraĵon, do kun la infanoj kiel aktoroj. Christoph Frank gvidos la infanan programon. Aliĝis ĝis nun 93 homoj, inter ili 38 infanoj; 67 homoj venas el eksterlando.



Christoph Frank siaflanke konfirmis ke estas efektive tre ampleksaj programideoj por infanoj sub la temo “bestoj”.

Pliajn informojn pri NR vi povas trovi tie: <http://esperantoland.org/nr/>

Ago-Semajno 2007

2007.12.27 – 2008.01.02, Malbork (urbeto apud Gdańsk), Pollando

Ireneusz Bobrzak skribis jenon la 18-an de oktobro:

Ĝis nun aliĝis ASON tri familioj kun 5-12 jaraĝaj infanoj, de Rusio, Hungario kaj Germanio. Entute 5 infanoj. Mi havas signojn, ke venos ankaŭ infanoj de Litovio kaj Ukrainio, sed ĝis nun ankoraŭ mi ne povas tion konfirmi.


Pri la infanoj okupiĝos la gepatroj – ni ne antaŭvidas specialan infanprogramon. Nia aranĝo estas pli proksima etose kaj programe al IJK ol NR. Tamen surloke ni organizos ludejon kun ludoj por la plej junaj, ankaŭ ni ebligos kontakton kun la lokaj infanoj, kiuj kelkfoje venados kun instruistoj al ASejo prezenti la popolajn kantojn kaj dancojn antaŭ la publiko.

Pliajn informojn pri Ago-Semajno 2007 vi trovos tie: <http://pej.aplus.pl/as/2007/>

★★★

Ĝojan julon kaj feliĉan novjaron!

CLAUDE ROUGET



9. LA SEMAJNO



 LUN-DON TRO-VIS MI LA HUN-DON EN HUNDEJ'.



 MAR-DON MAN-ĜIS ĜI LA LAR-DON EN MANGĜEJ'. MERK-



 RE-DON MAN-ĜIS ĜI RA-KE-DON EN FLU-GEJ'. TU-TAN



 JAŬ-DON MAN-ĜIS ĜI. VEND-RE-DON MAN-ĜIS ĜI BU-




 KE-DON. SA-BA-TON MAN-ĜIS ĜI KRA-VA-TON. DI-



 MAN-ĈON MANĜIS ĜI TAG-MAN-ĜON. MAN-



 ĜE-GIS LA TU-TAN SE-MAJ-NON ĜI.



53. NI IRIS SUR VOJETO

NI I-RIS SUR VOJ - E - TO, PRO - FUN - DE EN AR -

 BAR, JEN KAN - TIS KU - KOL - E - TO AL

 LA GE - KNA - BA AR'. KU - KO, KU - KO, KU -

 KO, KU - KO, KU - KO, KU - KO, KU - KO, KU -

 KO, KU - KO, KU - KO.

NI IRIS SUR VOJETO
 PROFUNDE EN ARBAR'.
 JEN KANTIS KUKOLETO
 AL LA GEKNABA AR'.
 KU - KO, KU - KO, KU - KO, KU - KO, KU - KO,
 KU - KO, KU - KO, KU - KO, KU - KO, KU - KO.

La porko kaj ĝiaj vivkondiĉoj

Norvega popolfabelo tradukita de **JON RØMMESMO**



La porko iam enuis pro siaj vivkondiĉoj. Tiam ĝi ekhavis la ideon iri al la juĝejo por esti aljuĝota la rajton vivi alimaniere. Li pensis, ke ankaŭ li rajtus serĉi la feliĉon – same kiel aliaj: la rezulto estu kiom ajn grasiga – male!

“Pri kio vi plendas?” demandis la juĝisto.

“Ho, sinjoro, miaj vivkondiĉoj tre enuigas min”, diris la porko. “La ĉevalo ricevas avenon, la bovino farunan trinkaĵon; kaj poste, aldone, ili kuŝas seke kaj agrable en stalofakoj. Mi ricevas nenion, krom ŝelaĵoj kaj gargara akvo. Tage mi vadas en koto, kaj nokte mi kuŝas turniĝante en fekaĵo kaj malseka pajlo. Ĉu tio estas justa kaj konvena, juĝisto?” la porko demandis.

La juĝisto opiniis, ke la porko iom pravas. Li traserĉis siajn librojn, kaj juĝis favore al alia vivmaniero. “Viaj vivkondiĉoj estas tro severaj kaj malĝustaj. Ekde nun via manĝaĵo estu pizoj kaj tritiko, kaj vi kuŝu en silka lito”, li diris.

La porko ja dankis, kaj tiom ĝojis, ke ekde tiu momento ĝi kvazaŭ konsciis nek pri tago nek pri nokto. Dum la tuta hejmeniro li zumkantis kaj gruntetis: “Pizoj, tritiko kaj silka lit' ! Pizoj, tritiko kaj silka lit' !”

La vojo kondukis al inter kelkaj arbaraj altaĵoj, kaj supre en unu arbareto la vulpo kuŝis aŭskultante. Kiel vi certe scias, tiu ne povas lasi siajn friponaĵojn, kaj nun li tuj ekagis. Li persiste pepis, sible kaj penetre: “Ŝelaĵ', rubaĵ' kaj kota lit' !”

La porko ne atentis pri tio. Ĝi persistis pri sia “Pizoj, tritiko kaj silka lit' !”. Sed ĉiame, ripete aŭdiĝis: “Ŝelaĵ', rubaĵ' kaj kota lit' ! Ŝelaĵ', rubaĵ' kaj kota lit' ! Ŝelaĵ', rubaĵ' kaj kota lit' !”. Fine tio eniĝis en la cerbon de la porko, kaj senkonscie ĝi komencis aŭskulti kaj imiti.

Veninte hejmen, ĝi ricevis jenan demandon: “Kia estis la rezulto? Ĉu vi ricevis juĝon pri pli bonaj vivkondiĉoj?”

“Hm – jes, hm – jes”, diris la porko. “Ŝelaĵ', rubaĵ' kaj kota lit' ! Ŝelaĵ', rubaĵ' kaj kota lit' !”.

Porinfanaj filmoj en Esperanto

Ĉu vi ŝatus vidi filmojn en Esperanto kun viaj 1-6-jaraĝaj infanoj? Ĉu vi jam vidis “Mazi en Gondolando” pli da fojoj ol vi povas nombri? Ĉu viaj geknaboj plendas pro la tedaj ‘reklamoj’ en Mazi? Ekzakte tiel mi sentis antaŭ kelkaj monatoj.

Mi konstatis ke kelkaj infanaj filmoj (ekz. Tomas Trajno, Barbapapa kaj Maisy la muso) estus vere facilaj traduki al Esperanto, ĉar estas nur unu voĉo.

Nun, monatoj poste, venas la fina rezulto de nia unua filmtraduka projekto: La 50-minuta filmo *Mejzi Ŝpruc* (angle: *Maisy Splash*) en kun parolo (kaj subtekstoj) en Esperanto.

La muso Mejzi kaj liaj amikoj (la sciuro Cirilo, la elefanto Eduardo, la krokodilo Karlo kaj la birdo Talula) ŝatas ludi per akvo kaj aliaj aferoj.

La filmo estas dividitaj en dek 5-minutaj epizodoj: Pingvenoj, Akvotubo, Ĉokolada

kuko, Bobeloj, Singulto, Naĝado, Fiŝoj, Glacio, Remado kaj Delfeno.

Mi invitas vin ĝui la rezulton de nia laboro, kiun vi povas elŝuti de la adreso: http://javabog.dk/filmoj_en_esperanto/mejzi_spruc/



Krom filmo por via komputilo vi trovos tie ankaŭ malgrandigitan version kiun vi povas meti en via poŝtelefono (ege konvena por ekzemple aŭto).

Venos poste eblecon aĉeti DVDan version de la filmo. Bonvolu noti ke vi devas akiri originalan ekzempleron de *Maisy Splash*, por kompensi la originalajn aŭtorojn por sia laboro. Instrukcioj kiel aĉeti originalon troviĝas en la retejo.

Mi esperas ke tiu ĉi filmo estos nur la komenco. Post alia filmo de Mejzi (ĝi nomiĝas: *Mejzi – tempo por ludi*) mi esperas traduki aliajn infanajn filmojn al Esperanto. Unue verŝajne estos filmo de la serio *Tomas Trajno kaj liaj amikoj*.

Korajn salutojn kaj bonan spektadon!

JACOB NORDFALK



Aliaj novaj DVD-filmoj

Mi ricevis du filmojn el brazila eldonejo *imagu* (<http://imagu.com.br>). Temas pri filmigo de *Gerda malaperis* de Claude Piron kaj de *La patro* de Kikuti Kan.

Neniu el tiuj filmoj estas profesia kino-arto, sed mi tamen imponiĝis de la kvalito de *Gerda malaperis*. Aktoroj bone ludas kaj eblas sekvi la preskaŭ duhoran filmon, ĝuante la enigmon pri malapero kaj liberigo de Gerda. Komencantoj kaj aliaj uzantoj de

Esperanto certe povas dediĉi vesperon por spekti la filmon, verŝajne la sola tute en (bona) Esperanto.

La patro estas siaflanke granda fuŝo kaj plena filma katastrofo. Aktorado estas terura (eĉ konsiderante ke ludas amatoroj), lumigo estas koŝmara, sono foje neaŭdebla kaj la tuto fariĝas senlime enua. Bedaŭrinde por la esperantistaj produktantoj! La sola utileco de la filmo estas kiel pedagogia ilo, por aŭdigi al lernantoj de Esperanto bone legitajn tekstojn.

CLAUDE ROUGET

Esperanto-familio Kim el Koreio

- **Patro:** Hiongun Kim, Nomota, komputilisto.
- **Patrino:** Suĵung Kim, Kristalo, iam en komerca kompanio, nun hejme kun sia fileto.
- **Filo:** Ĵinho Kim, 3-jara (naskiĝis en aprilo 2004).



Suĵung Kim (Kristalo), Ĵinho Kim kaj Hiongun Kim (Nomota)

Hiongun – Mi kaj Kristalo konatiĝis en 2000 dum la IJK en Honkongo. Ni geedziĝis en 2003 kaj en 2004 naskiĝis nia filo Ĵinho, denaske parolanta la korean kaj Esperanton.

Katja – Kial vi elektis havi dulingvan familion se kaj vi kaj via edzino estas koreoj?

H – Laŭprofesie mi estas sciencisto pri komputilaj lingvoj. El tiuj almenaŭ kvin mi “parolas” flue, aliajn kvin malpli. El la homaj lingvoj mi lernis la ĉinan, la japanan, iomete la germanan, pro la profesiaj kialoj la anglan, sed flue mi parolas nur la korean kaj Esperanton. Mi havis grandan intereson pri lingvoj, tamen neniam povis atingi la nivelon de dulingvismo. Sed kial ne mia filo, se li denaske provas tion?

Kiam mi edziĝis, mi tuj planis realigi mian malnovan revon havi dulingvan familion, iĝi mem dulingva. Por tio necesis studi la temaron, pliperfektigi min mem en Esperanto. Al mia bebo mi komencis paroli Esperante jam antaŭ lia naskiĝo. Nuntempe li jam komencas memstare formi vortojn en la korea, sed lia Esperanta vortstoko estas ne tiom granda. Por pliperfektigi en la korea li lernas el la televido, el sia medio, sed Esperanton li lernas nur de mi sola.

K – Ĉu vi havis problemojn trovi konvenan materialon pri kaj por E-edukado en familio?

H – Jes. Speciale la porinfanajn librojn, kantojn... En nia lando aĉeteblas tiuj nur en la korea aŭ en la angla. Pro tio mi mem esperantigis kelkajn el ili. Mi tamen havas ankaŭ E-sondiskon el Brazilo, ĝiajn kantojn mia filo ege ŝatas.

K – Sed la sudamerikaj melodioj ege diversas de la koreaj!

H – Jes! Pro tio mi mem devis multfoje ekzerci ilin kaj malrapide enkonduki ilin al la bebo.

K – Ĉu vi utiligis la ekzistantajn E-vidbendojn?

H – Mi konsciis, ke ĉe certa punkto la lernado de mia filo plirapidiĝis kaj ke mi bezonis pli da materialo. La plej utila montriĝis “Mazi el Gondolando”. Mazi estis origine produktita en 1986, do jam antaŭ 20 jaroj. Mi aŭdis, ke estis malfacilaĵoj ĉe la renovigo de la materialo en KD-formo. La Seula E-kulturcentro havis siatempe nur unu vidbend-kopion. Se mi uzus ĝin, post iom da tempo ĝi foruziĝus. Mi do dum du monatoj serĉadis, de kie aĉeti propran kopion. Fine mi mendis la kompaktdiskon de UEA kaj de ELNA kaj ekhavis ĝin sendita per ELNA el Germanio. Mia filo ŝatas ankaŭ “Pasporto al la tuta mondo” precipe pro ĝiaj humuraj dialogoj. Mi mendis de ĝi, same

kiel de Mazi, po du kopioj (unu iris al nia kulturcentro).

K – Ĉu vi nun kontentas pri la kondiĉoj por la E-edukado de via fileto?

H – Krei bonan Esperanto-medion estas ege grave, sed ne facile. Niaj najbaroj ne estas esperantistoj kaj pro miaj labordevoj ne estas simple organizi vojaĝon al lokoj, kie ni trovus esperantistojn. En Koreio mem estas kelkaj E-familioj, sed la daŭra problemo estas tempomanko.

K – Kiom da tempo vi povas dediĉi al via filo dum la ordinara semajno?

H – Mi estas unu el la fondintoj de la kompanio, kie mi laboras. La jam 70-kapa grupo prilaboras samtempe 10 – 15 projektojn. Ni laboras ĉefe por telekomunikaj firmaoj kaj estas sub la daŭra premo de konkurenco. Preskaŭ ĉiutage okazas neantaŭviditaj malfacilaĵoj kaj do ni daŭre havas ion por urĝe solvi. Ni, la ĉefaj respondeculoj, jam ŝerce nomas nin “fajrobrigadistoj”. Miaj labortagoj daŭras proksimume de la 6-a matene ĝis la 23-a, 24-a, eĉ 25-a nokte! Nur de la lasta jaro nia kompanio ĉesis labori ankaŭ sabate (en Koreio la feruigo de sabatoj komenciĝis nur antaŭ du jaroj) kaj tio donas al mi tempon por esti kun mia filo. Mi “ŝtelas” lin de la patrino, iras kun li ekzemple en parkon kaj kompreneble la tutan tempon parolas Esperanton.

K – Vi havas plian ligon al Esperanto ankaŭ pere de via redaktoreco de “La Lanterno Azia”.

H – Dum pli ol unu jaro mi sola redaktis la oficialan organon de la Korea EA, sed antaŭ tri-kvar jaroj transprenis la laboron aliaj. Mi respondecas nun nur pri la interreta komunikado. “La Lanterno” havas sian propran retpaĝaron, en kiu la redaktantoj interŝanĝas materialojn. Temas pri interna komunikilo, iaspeca forumo. Unu foje monate aperas ĝia fina versio en PDF-formato.

K – Via fileto baldaŭ eniros infanĝardenon. Kiom tio ŝanĝos la vivon de lia panjo kaj de vi? Kiujn planojn vi havas por la estonto?

H – Mia edzino, Kristalo, volas eklabori denove en iu komerca kompanio. Ĝis nun mi sukcesis ‘iamaniere’ malhelpi tion, sed mi antaŭvidas, ke Ĵinho povos iri al infanĝardeno venontjare kaj do Kristalo al sia propra laboro. Mi daŭre parolos Esperanton kaj serĉos pli strategiajn rimedojn por daŭrigi la dulingvismon laŭ la aktuala nivelo de mia filo. Mi pensas, ke la plej efika rimedo estas ‘esperanta vojaĝo’. La ĉijara UK estis tiusence granda sukceso kaj mi jam serĉas Esperanto-renkontiĝojn venontjarajn por nova vojaĝo.

Intervjuis KATJA STEELE

E-familioj en Pasporta Servo

2007.11.01: jen limdato por aliĝi al Pasporta Servo 2008. Tion vi povas fari je tiu ĉi adreso: tejo.org/eo/ps_aligxilo_form. Provu eĉ se jam estas post 1-a de novembro! Se vi nur deziras gastigi ĉe E-familioj, sciu ke PS havas multajn gastigantojn kiuj bonvenigas infanojn kaj familiojn.

E-familioj estas bonvenaj inter alie en Valencia (Hispanio), Mór (Hungario), Lahore (Pakistano), Przygodzice (Polio), Cheboksary kaj Kirov (ambaŭ Rusio), La Chaux-de-Fonds (Svisio).


Se vi aparte deziras gastigi ĉe E-familiojn, tiam veturu al Eupen (Belgio), Vitória (Brazilo), Felixstowe (Britio), České Budějovice (Ĉeĥio), Nantes, Rennes kaj Sainte Foy la Grande (Francio), München (Germanio),

Baja kaj Mosonmagyaróvár (Hungario), Montréal (Kanado), Zagreb (Kroatio), Luxembourg, Tromsø (Norvegio) aŭ Tashkent (Uzbekio).

Multaj aliaj bonvenigas familiojn kaj infanojn sen menciigi ĉu ili preferas familiojn en kiuj ĉiuj membroj parolas la internacian lingvon, aŭ ĉu ne gravas.

Cetere rimarku ke en Tromsø, norvega urbeto norde de la polusa cirklo, ekzistas **du** familioj, anoj de PS kaj kies ĉiuj membroj parolas Esperanton.

CLAUDE ROUGET (Tromsø-ano)



“Au pair” parolas Esperanton kun infanoj

Ni vivas en franca regiono proksima al Germanio, kie la loĝantoj estis dulingvaj antaŭ la dua mondmilito. Pro la franciigo, nuntempe oni devas batali por starigi dulingvajn lernejojn. Nur 7 % de la infanoj havas nuntempe tiun ŝancon. Kiam ni konsciiĝis pri tio, nia plej aĝa filino jam havis kvin jarojn kaj la dua havis du jarojn. Ni do decidis kalkuli nur pri niaj fortoj por dulingvigi niajn infanojn, kaj ni elektis Esperanton kiel hejma dua lingvo.



Joanne (1,5 j.), Annaïs (8 j.), Nian Peng, Maureen (5,5 j.) kaj Cyrille

Tri jarojn poste, ni kvinopas kaj al la bebo mi parolas nur esperante, sed la du plej aĝaj iras al nur franca lernejo, vivas en kvazaŭ nur franca medio, kaj ne tiom multe aŭdas esperanton. Nur iomete ĉiutage. Vojaĝi al Esperantio estas kosta, ĉirkaŭ 300 eŭroj por dutaga semajnfino, ĉefe al Germanio ĉar en Francio, laŭ ni, oni tro ofte krokodilas. Des pli kiam la plenkreskuloj kredas ke la infanoj ne komprenas, kaj alparolas ilin france. Kiel do vi kredas ke juna infano klopodos poste paroli iun ajn lingvon ol la sia? Ankaŭ mia edzino lernas Esperanton nur kiam ŝi aŭdas min paroli al la bebo. Kiel do aktivigi ĉiujn dum longa tempo?

Esperantlingva “Au pair”-junulino

De longe ni pensis gastigi knabinon kiel “Au pair”, samranga, ĉe ni. Ĉar ni estas francoj,

ni devas sekvi la Strasburgan interkontrakton pri “Au pair” subskribita en 1969. Tiu traktato devigas nin gastigi junan francparolantan knabinon en unuopa ĉambro, pagi poŝmonon po 250 eŭroj monate, ebligti kaj pagi kursojn en la franca lingvo. Kutime, tia loĝado estas interesa en grandaj urboj, kaj la traktato celas protektadon kontraŭ konkureco al hejmaj laborantoj. Kontraŭe, “Au pair”-knabino ne bezonas laborpermeson kaj ne havas salajron. Pro tio

oni pagas socian asekuron laŭ kalkulmetodo kies malfacileco estas tipe franca. Do simpla “Schengen” vizo ebligas trimonatan restadon, kaj interrete, mi iam legis pri somera “au pair” aranĝoj, kiuj ne devigas sekvi kursojn. Nuntempe, mi dubas ke tia ebleco vere laŭleĝas, ĉar mi neniam retrovis informon pri ĝi. Tamen, ni decidis gastigi knabinon kiam aperis eklaboru.com, ĉar ni pensis ke eblos trovi iun esperantiston por havi tutan monaton en Esperantio por la prezo de nur semajnfino. Ni pravis. Post du tagoj, ni ricevis proponon de Nian Peng el Ĉinio por restado

okazonta en septembro.

Spertoj de la familio Hurstel

Tiun monaton, uzado de esperanto draste kreskis inter ni, eĉ se la infanoj bezonis nur unu tagon por malkovri ke Nian komprenas la francan. Tamen, Annaïs, la plej aĝa, pli kaj pli ofte parolis esperante kaj povis enmiksiĝi en la plenkreskulajn diskutojn ĉirkaŭ la tablo. Maureen, la dua, parolis nur kiam ŝi solis kun Nian, sed ŝi kutimiĝis al pli intensa uzado de fremda lingvo. Ŝi nun ĝoje lernas la germanan en la lernejo, kaj eĉ ŝatis spekti filmojn en la ĉina kun Nian.

Al tiuj kiuj ŝatus provi la samon, ni konsilas: kutimiĝu al uzado de esperanto por la ĉiutaga vivo, ĉefe se la infanoj ne denaskas. Unu monato estas bona provo por

via hejmo, ĉar oni neniam certas ke la aldonado de alia membro al la familio glatos. Interkonsentu kun iu, kiu ne bezonas vin por sia vizo. La afero estas jam sufiĉe kompleksa.

CYRILLE HURSTEL

Spertoj de Nian Peng

Meze de aŭgusto, mi laboris ĉe sinjoro Cyrille Hurstel kiel "Au pair". Mi pasigis mian specialan monatan someron ĉe ili. Ĝis nun, mi kelkajn fojojn ankaŭ renkontis la tri mirindajn knabinojn en miaj songĝoj.



Lastjare, mia patro hazarde legis paĝon www.eklaboru.com en interreto. Kaj "Au pair", iu nova nomo de laboro altiris lin. Post nia ekkono pri kio estas "Au pair", mi decidis mem proponi min. Kaŭzas ke mi volas vojaĝi al Germanio post mia agrabla vojaĝo de antaŭ tri jaroj, unue mi skribis al iu germania familio, sed bedaŭrinde eble ili jam trovis aŭ eble mia kondiĉo ne taŭgis, mi ne ricevis respondon. Vere, tiam mi estis iom elreviĝinta, sed la ŝancon ĉiam mem venas kiam vi preskaŭ forgesis ilin. Dua hazardo okazigis mian Obernai-a somero. Ankaŭ orienta Francio interesas min, en miaj tri francaj vojaĝoj, mi neniam estis tie, finfine dank' al tiu laboro "Au pair", mi povas viziti ankaŭ tiun parton, perfekte!

Gesinjoroj Hurstel estas tre viglaj, ili ofte faras ion, kio multe tuŝas mian koron. Ĉefe

nun el miaj memoroj. Kiel nia antaŭkontakto, ili aĉetis la bileton por veturi al Strasbourg el Plouezec por mi, sed mi devis ŝanĝi la stacidomon en Parizo, kiam mi mem zorgas kiel aĉeti la metroan bileton mi mirinde trovis ke en la koverta akompanas du metroaj biletoj, kaj post la klarigo de apuda sinjoro, mi komprenis ke la du diversaj koloraj biletoj estas nova kaj malnova, eble oni ne plu povas uzi la malnovan bileton nun. Ili preparis du biletojn por antaŭ solvi ĉiujn eblecojn. Tuj mi varme sentis!

Fakte, mi ne vere laboras kiel "Au pair", ili min traktas kiel la kvara filino, sola tasko de mi estas devigi la infanojn paroli esperanton. Mi ĉiam devas paroli esperanton kun ili kiel nia natura lingvo. Mi ne povas kompari kun antaŭe, sed laŭ la vortoj de gesinjoroj Hurstel, la infanoj bone adaptiĝis al esperanto en la vivo. Ankaŭ mi trovas amuze, kvankam ili scias ke mi parolas francan sed ili aŭtomate esperantis kun mi, eble finfine, mi estas fremdulino por ili. Kun la infanoj, mi ankaŭ bone lernas francan, mi aŭdis iliajn interbabilajojn, mi legis liajn librojn kiuj taŭgas mian francan nivelon, ktp. Dum la semajnfino, ili ofte planis ion programon por mi, mi neniam enuis ĉe ili, estis tre riĉa ferio.

Dank' al eklaboru.com kaj gesinjoroj Hurstel aŭ dank'al mia patro kaj mia mempropono, mi ne scias. Sed mi kredas ke tio estas la *antaŭdestinita altiriĝemo* kiel la ĉinoj ofte diras.

NIAN PENG

Senpagaj infanlibroj

Mia filo jam ne plu estas infano sed 18-jara – tial li partoprenis jam TEJO-seminaron lastjare en Germanio. Mi ankoraŭ havas multajn bildlibrojn kaj legaĵojn kiujn li ne plu bezonas. Volonte mi fordonacus ilin!

DIETER ROOKE
dieter.rooke@tiscali.ch

Tajperaro pri nomo

Eva Formaggio trovis bedaŭrindan tajperaron en la artikolo kiun ŝi sendis por la pasinta numero de *Familia Esperanto*. La nomo de la aŭtoro de la libro *Hold on to your kids* estas korekte **Neufeld**, kun "f", ne Neugeld, kiel aperis en FE47.

Tuxpaint en Esperanto

Edmund Grimley Evans tradukis ĉi somere la porinfanan desegnoprogramon *Tuxpaint* (vidu <http://tuxpaint.org>). Li nun bezonas helpon de iu kiu havas ioman konon pri Linux kaj povas kunmeti kaj poste provi la programon. Kontakto lin rekte je: edmund820@rano.org



Mallongaj anoncoj?

Vi ne bezonas verki tutan artikolon por *Familia Esperanto*. Eble mallonga anonco, peto, instigo, desegno de viaj infanoj, gratulo aŭ eĉ kritiko, estas same valora por la legantoj de la bulteno. Sendu vian kontribuaj(et)on antaŭ la 2-a de februaro 2008.

Skribu al Avo Frosto en Esperanto...

... kaj li respondos ankaŭ en Esperanto!

Kristnasko 2007 alvenas kaj kiel ĉiujare, miloj da infanoj el Kanado kaj la tuta mondo skribos al Avo Frosto. Tradicie en Kanado infanoj kiuj skribas al li en la franca, angla aŭ en dudeko da aliaj lingvoj ricevas respondon el la norda poluso. Denove en 2007, la infanoj kiuj skribos al Avo Frosto esperante, ricevos respondon en Esperanto.



En 2001, la Esperanto-Societo Kebekia (ESK) traktis kun la Kanada Poŝta Servo sugestante la uzon de Esperanto por

komuniki kun la esperantlingvaj infanoj de la mondo. La Kanada Poŝta Servo jesis al la propono de ESK kaj ekde Kristnasko 2002, Esperanto estos inter la korespondaj lingvoj uzataj de Avo Frosto kaj siaj helpantoj, la volontuloj de la Kanada Poŝta Servo por subteni alfabetigon.

La Esperanto-Societo Kebekia invitas ĉiujn esperantistojn, junaj kaj junkoraj, malkovri tiun kristnaskan tradicion skribi al Avo Frosto. Simple sendu manskribitan leteron al la sekva adreso:

**AVO FROSTO
NORDA POLUSO
KANADO – CANADA
HOH OHO**

Avo Frosto preferas manskribitajn leterojn, eĉ se skribitaj de etaj manoj kiuj lernas skribi. Ne forgesu klare skribi vian nomon, adreson, indiku 'ESPERANTO' por certigi respondon en la ĝusta lingvo.

Ni ankaŭ invitas la esperantistojn kaj la esperantistajn organizojn tra la mondo varbi pri tio tiel ke la esperantlingvaj infanoj povos skribi al Avo Frosto ĉi jare. Por ricevi pliajn informojn, kontaktu nin je: informo@esperanto.qc.ca

NORMAND FLEURY

poemeto de Inger Hagerup



La tomato kaj la cepo

(tradukita el la norvega de Jon Rømmesmo)

Tomato pendas en la suno.
Kontente pensas tiele, ĝi:
“Plenas mi de vitaminoj,
kaj ĉiuj ĝojegas pro mi!”

Sed cepo kuŝas en kelo.
Pri enigmo sia cerbumas ĝi:
“Mi nur plorigas la homojn.
Kio, ja kio estas al mi?”

